

El fervoja mondo 6/2015

Belgio: **Kapacito de sidlokoj kreskos al 400 mil**

Belgaj ŝtataj fervojoj *SNCB* konstante modernigas kaj kompletigas sian veturilaron. En jaroj 2025 ĝis 2030 ili deziras disponi pri vagonoj kun suma kapacito 400 000 sidlokoj. Tio koincidas kun kreskanta nombro da pasaĝeroj en dekoj da procentoj. Belgio en lastaj jaroj aĉetis multajn elektrajn motorvagonkombinaĵojn *Desiro Classic* kaj duetaĝajn pasaĝervagonojn *M6*. Nun oni planas kompletigi la nombron de duetaĝaj veturiloj *M7* kaj modernigi duetaĝan tipon *M5* kaj 44 elektrajn vagonkombinaĵojn *AM75* por 147 milionoj da eŭroj.

La plano krome enhavas intencon pligrandigi disponeblon de veturilaro de 80 al 86 procentoj.

Hinda Unio: **Hinda Unio pli investos en fervojojn**

Hinda registaro prezentis buĝeton por 2015 kaj venontaj jaroj, kiu kalkulas kun reformoj de la plej granda laboradanto en lando, kiu estas enlandaj fervojentreprenoj. Tiuj samtempe estas taksataj kiel la plej granda en la mondo. La registaro decidis, ĝis jaro 2019 investi en fervojojn ĉirkaŭ 121 miliardojn da eŭroj. Prezoj de fervojbiletoj en komenca periodo ne kreskos. Transporto de varoj tamen kreskos je 10 procentoj. Jam en unua jaro 2015 investoj kreskos je 52 procentoj al unu biliono da hindaj rupioj. En venontaj kvin jaroj kapacito de pasaĝertrafiko kreskos de 21 milionoj da vojaĝantoj en tago al 30 milionoj. Fervoja reto kreskos je 20 procentoj al 138 000 km. Kapacito de vartrafiko kreskos je 50 procentoj al 1,5 miliardoj da tunoj.

Israelo: **Nova rekordo en nombro da vojaĝantoj**

Israelaj fervojoj jam trian fojon sinsekve superis historian rekordon en nombro de transportitaj vojaĝantoj, kiam en la jaro 2014 uzis iliajn servojn 48,5 milionoj da pasaĝeroj, je 7,5 % pli multe ol en 2013. Ĉijare oni atendas superi limon 50 milionoj da vojaĝantoj kaj en jaro 2020 eĉ 70 milionojn da klientoj. Nombro da trajnkunligoj kreskos de nuntempaj 450 al 860. Kresko koincidas kun konstruado de novaj fervojlinioj (konstruataj estas kvin novaj linioj). Estas preparata elektrizo de 420 km da fervojlinioj kaj planata aĉeto de elektraj lokomotivoj kaj duetaĝaj elektraj motorvagonkombinaĵoj.

Ĉeĥio: **Foiro Czech Raildays okazis jam deksekan fojon**

Preskaŭ ducent ekspoziciantoj el tuta Eŭropo, fakuloj, sed ankaŭ ŝatantoj de fervoja tekniko uzis eblon renkontiĝi dum dekseka foiro de fervoja tekniko *Czech Raildays*, kiu okazis en tradicia tempo en nordmoravia urbo *Ostrava-Prívov*. En la tagoj 16-a ĝis 18-a de junio 2015 fakuloj kaj vasta publiko surloke povis trarigardi diversajn lokomotivojn, pasaĝer- kaj varvagonojn, sed ankaŭ ekzemple veturilojn de urba amasa trafiko.

La unua foira tago komenciĝis dum plensunumata mateno kun muziko kaj marŝado de junaj dancistinoj, kiuj jam tradicie tiun ĉi enlandan fervojan solenaĵon komencas. Post enkondukaj alparoloj kaj salutvortoj fare de fakaj delegitoj kaj studentoj komenciĝis trarigardo de ekspoziciataj veturiloj kaj iliaj apartenaĵoj, konstrumaŝinoj por bontenado aŭ modernigo de fervojlinioj, aŭ aliaj diversaj mekanismoj.

Samtempe okazadis en hotelo *Clarion* en *Ostrava* fakaj seminarioj kaj konferencoj. Jam tradicie la foiro servis ankaŭ por intertraktadoj inter partneroj, kion ankaŭ naciaj trafikistoj uzis.

„Ni faris dialogojn ne nur kun partneroj el entrepreno *ZSSK*, sed ankaŭ kun koordinantoj el *Olomouc*, respektive kun kolegoj el Moravosilezia regiono“, diris reprezentanto de Ĉeĥaj Fervojoj *ČD Michal Štěpán*.

Multe oni diskutis ankaŭ en kolokvaro, precipe pri aktualaj problemoj de trafika priservo kaj situacio en tro frue malfermita merkato de pasaĝera fervojtrafiko. Tiu ĉi ja alportas multajn problemojn, kaj ne eblas antaŭe diri, ke ĝi estas eĉ por civitanoj en Ĉeĥa respubliko paŝo en ĝusta direkto.

Nacia trafikisto prezentis aron da modernigitaj veturiloj

Ekspozicio de Ĉeĥaj Fervojoj en 2015 montris kolekton de trenataj veturiloj, el kiuj kelkaj estis prezentitaj jam en lastjara foiro. „Nuntempe nacia trafikisto realigas vicon da projektoj en sfero de novaj aŭ modernigitaj veturiloj, kaj atente pri niaj klientoj ni bezonas ĉi tiujn veturilojn frue entrafikigataj. Pro tio ni ĉijare cele plenumi devoligajn limdatojn unue vicigis fabrikadon de veturiloj antaŭ ilia propra prezentado, kaj ĉiujn novajn veturilojn por longdistanca trafiko ni decidis kiel kompletan prezenti en *Czech Raildays* en 2016. Tamen ni ĉijare kunportis al *Ostrava* por prezenti kolekton de niaj modernigitaj pasaĝervagonoj *Abpee*, *Bbgmee* kaj *Bmz* kun porinfana kinejo, kaj ankaŭ unu renovigitan restoracian vagonon serio *WRmee*“, diris *Michal Štěpán*.

Baptitaj estis ankaŭ speciala trakciilo por diagnoziko kaj tramo senproblema por handikapuloj

En unua foira tago krome okazis ankaŭ kelkaj baptoj. Por Praga trafika entrepreno estis prezentata nova basplanka tramo *EVO1*, kiu estis komuna projekto de firmao *Škoda Electric*, Maŝinejo kaj Riparejo *Krnov* kaj Trafika entrepreno de ĉefurbo Prago.

Ĝenerala direktoro de kompanio *SŽDC Pavel Surý* kune kun *Michal Štěpán* krome solene prezentis specialan trakciilon por diagnoziko de fervojaj sekurigsistemoj, kiu estis konstruata el motorvagono *M51.014*. Tiun konstruon plenumis filia kompanio de Ĉeĥaj Fervojoj *DPOV*, kiu ekipis la veturilon per plej moderna tekniko por mezurado de radioretoj, diagnoziko *ERTMS*, sed ankaŭ per testado de indikiloj pri varmigo de radaksoj aŭ kontrolo de videblecdistanco al signaliloj. La motorvagono krome ricevis klimatiz-instalaĵon, kelkajn litojn por teknika personaro, novan motoron *Caterpillar* kaj "sofistikan" kondukistejon de trakciilestro. Detalojn de la alikonstruo klarigis dum gazetara konferenco ĉeestanta ĉefo de la firmao *DPOV Roman Kott*.

Sian lertecon montris fervojaj fajrobrigadistoj, kiuj preparis prezenton de akcidenthelpa agado kaj koncerna tekniko.

Oni povis vidi ankaŭ du veturilojn de plia filia kompanio de Ĉeĥaj Fervojoj – kompanio *VÚŽ Praha*. La unua estis mezurveturilo *MV1* por elektroteknikaj kaj bremsprovoj, kiu estiĝis – simile kiel la diagnozika motorveturilo – per alikonstruo de pli malnova veturilo. Unu veturilo de origine alternkurenta tracio serio *560* estis lastjare alikonstruita nur por kontinukurenta sistemo kaj permesas kontrolojn de mallongtempaj interrompoj en kurentoprovizado aŭ kurtcirkvitojn en sistemo de elektra hejtigado de vagonoj kaj lokomotivoj. Samtempe eblas per veturilo *MV1* plenumi lokajn kaj bremsadajn veturprovojn.

Dua veturilo de *VÚŽ* estis historia termikmotora lokomotivo T499.002 nomata *Kyklop*.

Alloga fariĝis ankaŭ unua prezentado de dizelelektra lokomotivo Vectron

Unu el la plej allogaj prezentataj objektoj fariĝis dizelelektra lokomotivo *Vectron* de la firmao *Siemens*. Flanke de intereso restis nek ĝia fratino – plurkurenta elektra lokomotivo tipo *Vectron MS* aŭ lokomotivo *Traxx* de firmao *Bombardier*. La dizela *Vectron*, kiu estis ĉijare en *Ostrava* prezentita unuan fojon, plenumas rigorajn postulojn por pureco de ellasproduktoj kaj disponas pri rimarkinda povumo 2.4 MW. Laŭ anonco de la fabrikisto ĝi apartenas en sia kategorio al malplej bruaj eŭropaj motorveturiloj. Kompanio *Alstom* alportis modernan motorvagonkombinaĵon *Coradia Lint 41*, kiu komencos trafiki ekde dua duono de 2016 en Germanio precipe sur fervoja reto *Oberpfalzbahn* aŭ *Länderbahn*. Oni planas entrafikigon ankaŭ en Ĉeĥio sur trajnkurso *Marktrewitz - Pomezí nad Ohří - Cheb*.

Atmosferon sur ekspozicia spaco kompletigis ĝardeno fervojeto kun junaj entuziasmoj. Kaj kiam la vizitantoj pro granda varmeco estis lacaj, eblis sidiĝi kaj refreŝiĝi en servopretaj vagonoj de ĈD aŭ de slovaka kompanio *ZSSK*, devenantaj el vagondeponejo *ŽOS Vrútky*, aŭ en ilia najbareco admiri basplankan motorvagonkombinaĵon serio *861*, kiu ĉiam pli ofte estas videbla sur slovakaj trakoj.

Preparis Jindřich Tomíšek,
reviziis Heinz Hoffmann